LA DATREVENO DE LA LEONO

Rakonteto por Infanoj

Antaŭlonge, la bestoj kuniĝis por festi la naskiĝdaton de la leono. Ĉiuj bestoj estis invititaj de la tigro, kiu havis grandan ideon: profiti la eventon por elekti la reĝon de la bestaro.
Ĉiuj ili aprobis lian proponon.

Vespere okazis granda festo en la arbaro.
La bestaro tre ĝojis.
La bankedo estis riĉega:
multe da manĝaĵoj kaj drinkaĵoj sur la tablo.

Kelkaj bestoj, kiuj partoprenis en la festo, apogis la ideon de la tigro: elekti la leonon kiel reĝon de la bestaro.

Sed estas problemo! Diris subite la Zebrino.

**Problemo? Kia problemo?
Miris la leono.**

**Kiel oni povas elekti, se estas nur unu kandidato?
Demandis la zebrino.**

**Kio? Muĝis la leono.
Kion vi diris???
Mi ankoraŭ iom malsatas.
Mi ŝatas manĝi ion…
Eble ian zebrinon…**

Ĉiuj bestoj retropaŝis time.
Nur la zebrino restis kun la leono, kaj diris:

Eĉ se vi manĝus min,
ankoraŭ restus la problemo:
Kiel oni povas elekti, se estas nur unu kandidato?

Do ankoraŭ estas problemo…
Flustris la leono.
Mi devas cerbumi!

La bestoj revenis, kaj ili ĉiuj cerbumis kune...

kaj cerbumis kaj cerbumis kaj cerbumis kaj cerbumis…

?

Mi havas ideon, diris fine la zebrino. Sed vi certe havas pli bonan ideon, ĉar vi estas tiel saĝa…

Ĉu vi vere havas ideon? Miris la leono.
Do ni povas kunlabori kune.
Kio estas via ideo?

Tio ĝuste estis mia ideo –
ni povas kunlabori kune!
Diris la zebrino.

Do mi mem trovis la solvon! Ĝojis la leono. Mi vere estas tre saĝa! Kunlabori kune! Kia brila ideo!

Ĉiuj bestoj tre ĝojis, kaj ekde tiam la leono kaj la zebrino regis kune la arbaron…

Teksto verkita de Liette Lêla

Kunlaboranto:
Amir Naor